

November, 1926

The Little Thinns	Page
The Little Things	1
News and Notes from the Central Office	2
Radio	3
Book Reviews	4
Biblioteko Tutmonda Eliras!	6
A Reminiscence of the Sixth Congress	9
For the Beginner	10
Second Course in Esperanto	12
Vivanta Muzeo	15

KORESPONDANTOJ Finnlando: Erkki S. Turunen. Litovujo: Pulgis Lemaitis. Italujo: Allessandro Mazzolini, L. K. Hungarujo: Puskas Latvan. Francujo: Salo Grenkamp, L. K.

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, Inc.

A propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

HERBERT M. SCOTT, L. K., Editor

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town-is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club Group Charter-\$1.00. secretary.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleja Esperanto Rondo.-Hilda F. Mills, Secy., 18 Northampton Ave., Berkeley, Calif. Meets Saturdays 7.30 P. M., Meeting House of Society of Friends.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.-Rooms 309-311 de Young Building, San Francisco. Miss L. J. Marshall, Sec.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association: Meets each Monday evening at 8 in Room 25, 747 St. Catherine St., West, Sek. G. E. Warner.

TORONTO, CANADA

Por informoj pri la kunvenoj de la Toronta Esperanta Societo, skribu al Sinjoro Harry Wall, 716 Rhodes Ave., Toronto 6.

DENVER, COLORADO

Denver Esperanto Society meets Wednesday at 8 P. M., Room 2, 1310 Walton Street. W. A. Buchheim, Sec., 1435 Race St.

WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto Asocio, and class, first, third and fifth Thursdays, 8.00 P. M. During the summer, 706 11th St., N. W., Apt. 53.

ST. PETERSBURG, FLORIDA.

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. 211 7th Ave. North.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. -Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill. La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave. -Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 221 7th St. TOPEKA, KANSAS.

Topeka, Kansas Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-iino, Fino Leone Newell, 635 Watson St.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.-Business Institute, every Friday, 8 P. M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

DETROIT. MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M. to 9 P. M. except Tuesday and Friday. Classes meet Tuesday and Friday, 8.10 P. M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.-B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.-Miss L. F. Stoeppler, Sec., 63 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave,

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

The Cleveland Esperanto Society, 9010 Detroit Ave., every Tuesday, 7.30 P. M. S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y. West Phila. High School for Boys. Monthly meeting for business every fourth Friday at Y. W. C. A., 18th and Arch Sts., 8.15 P. M. Social and class meetings on same hour and place on other Fridays. Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.). Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Liv-

ingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. -J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. - S-ino B. H. Kerner, Sck., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

MADISON, WISCONSIN Esperanto Office, 119 W. Main Street.

Amerika Esperantisto

ORGANO de la

ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO

507 Pierce Bldg., Copley Square Boston 17, Mass., U. S. A.

ONE DOLLAR A YEAR

Vol. 37.

November, 1926.

No. 1.

THE LITTLE THINGS

We have received a letter from which we quote the following: "I wish some time you would insert a brief article relative to the helpfulness to the cause, in general, of correspondence with beginners in certain lands. Most of our samideanoj seem to be waiting to do some 'great thing by and by,' scorning the little things (and the attendant sacrifice of a little time and genial effort) which, multiplied, would mean so much to our movement. Germany, doing more than any other land, having thousands of children keen for interchange of cards, etc., cannot secure the desired intercommunication; their bids in the gazettes go unresponded, mostly. For several years I have had a box handy under our reading table, into which every member of the family drops pages and clippings of pictures, colored ads., etc., for me to look over and select from for transmission to various youngsters making their first struggles at Esperanto correspondence. Every now and then when I get a half hour or so I write simple explanations or comments, and when I make up a packet I also drop a few lines by post card advising of the sending. Everywhere, children are eager to hear from the U.S., to get our bright-colored cards and fine illustrations. Why do not some of those who take it out in dreaming of the great day of Esperanto triumphs (hoping to drop in at the head of the parade, perhaps) add their little mites of helpfulness NOW? I used to be one of those pipe-dreamers, but long since shamed myself out of it. Next to being a cheap, shackled dope-fiend, I know nothing so terribly cheap and ineffective as a person who contributes to any cause great gobs of make-believe heroics and not a drachm of actual concrete doing. Give 'em a little roasting."

Not necessary. You do it for us. Nuf ced. Thanks, Mr. Ferguson, for writing our editorial for us. All we add is—Bravo! Amen! Go thou, gentle reader, and we, ungentle editor, and do

likewise.

700.007-03

NEWS AND NOTES FROM THE CENTRAL OFFICE

Florida. In an announcement recently received of the evening course given in the Miami High School, Esperanto is listed, and a special announcement has been made of the Esperanto section. The course is given under the direction of Dr. Joseph Jasin, a graduate of the University of Cincinnati, who has been an Esperantist for many years. The class meets twice a week.

Dr. Jasin is much gratified with the make-up of the group and

expects it to increase considerably.

Maryland. A group of more than twenty ladies and gentlemen accepted the invitation of Miss E. W. Weems for a five o'clock tea at the home of Mrs. Thomas Manson of Baltimore on Sunday afternoon September 16. It was a tri-city gathering as Annapolis and Washington were also represented. Before tea was served the group sang "Ho Mia Lando," and after tea there were five minute talks by each one. Mr. Allan Davis of Washington gave a report of the Edinburgh International Congress, from which he had just returned. Miss Amy Leavitt, Treasurer of E. A. N. A. spoke of the Philadelphia Congress. Rev. J. L. Smiley told of the activities in Annapolis, and Dr. Francis C. Nicholas, Dean of the Maryland Academy of Sciences, of the Baltimore work as well as Mr. H. S. Randall, Chairman of the Esperanto Section of the Maryland Academy. Mr. Adam Bartosz of the Jednoso-Polonia, a Polish-American newspaper, gave an amusing story in Esperanto followed by remarks in English on the value of Esperanto. Plans for the coming season were discussed, and before leave-taking all joined in singing La Espero.

New York. The New York Esperanto Society had an unusually large attendance at its October Barĉo. Mr. Lewis H. Maury, the new President, voiced the sentiments of all in being honored by the presence of Mr. and Mrs. Rufus W. Powell. The occasion had been planned as a celebration of the golden wedding of these beloved friends. For Mrs. Powell was a bouquet of golden yellow flowers tied with golden ribbons and for Mr. Powell a boutonnier of the same flower. Greetings followed from E. A. N. A.; a beautiful card of congratulation was signed by all as a souvenir of the occasion. Other speakers were Mrs. Cora Butler Fellows, Mr. J. F. Morton, Miss Della Lincoln, Mr. Max Amiel, Mr. D. J. Klajin, all speaking of their love for these dear friends and the hospitality they had enjoyed in the Powell home, wishing them added years of joy. Nor did they fail to tell of Mr. Powell's great service to Esperanto, for which he never claimed any credit.

Mr. Powell was much touched with the affection shown and expressed surprise that this notice was taken of their anniver-

sary.

Another event of the evening was the presentation of a United States flag to Mr. Ginsuki Saba as a farewell souvenir from the New York Esperanto Society and "Harmonio." Mr. Saba has been studying in the University of Illinois. He spent the summer in New York and is now returning home to Japan. Mr. Saba felt greatly honored with the gift, and said he would never forget the pleasant memory of the occasion and promised to present the salutations of the group when he reached his home land.

Miss Helen Eaton, who gave the course in Esperanto at Columbia University in the summer under the auspices of the I. A. L. A. and several radio talks from Gimbel Brothers studio for E. A. N. A., is now giving one of the experimental courses in Esperanto which the I. A. L. A. are conducting, at the Browning School.

Wisconsin. After returning home from the Philadelphia Congress, Prof. F. A. Hamann with other Esperantist friends went on a two weeks camping trip through Wisconsin. Each of the three automobiles was decorated with a green star, their purpose being to do propaganda work throughout the trip. At Madison they were the guests of Mr. and Mrs. Glenn P. Turner, and one evening Mr. Hamann spoke of the Progress and Prospects of Esperanto at the State capitol.

E. J. Meriam, Secretary.

RADIO

During the recent "Radio Week" there was an Esperanto Booth at the Radio Show in Cleveland conducted by members of the Cleveland Esperanto Society. Many circulars were given out, questions answered, and as one of the results an Esperanto class at the West Side Y. M. C. A. made up of members of the Cleveland Wireless Association is being taught by Mr. J. B. Lindsay. A radiogram was sent to the Central Office during the exhibition.

The Twin-City (Minneapolis-Saint Paul) Esperanto Club had a booth at the Northeastern Radio Show in Minneapolis "Radio Week." Books, magazines, and posters were displayed and on sale, and special stress was laid on the use of Esperanto in radio by those who were in attendance. Several hundred pieces of lit-

erature were sold, ranging from keys to lesson books. Many persons expressed a desire to learn the language. The managers of the Radio Show expressed their satisfaction at the exhibit and indicated that they would like to have it an annual feature. A

radiogram was also sent to the Central Office.

Professor Edwin Clarke sold nearly 200 booklets within three days after his introductory talk of October 11th over WCCO. He requests those taking the course of lessons to provide themselves with books and also to have a pencil and note book at hand while listening to the lessons.

BOOK REVIEWS

"Grava Popolhigiena kaj Socia Demando." Originale en Esperanto, de H. Salokonnei. 53 pp. "Esperanto Instituto de Finlando," Kluurikatu 7. Helsinki. paper, 35 cents.

La celo de la libro estas:

(a) esti modesta provo por unua mallonga lernolibreto pri abstineco en la mondo,

(b) prezenti eldiraĵojn de plej eminentaj finnaj kaj eksterlan-

daj ekspertoj pri la alkoholdemando,

(c) doni koncizajn informojn pri la influoj de alkoholmalper-

meso en Finlando kaj Ameriko, kaj

(d) interesigi esperantistaron al unu el la plej gravaj demandoj de la nuna tempo, nome al kontraŭalkohola demando por akiro de pli certa sciado kaj konvinko pri ĝi.

Mia plej granda ĝojo kaj plej insista peto estus, ke la samideanoj faru ĉion eblan por disvastigi la libreton kaj ke ĝi eĉ

iamaniere povu servi al la granda ideo.

Forta argumento, tre interesa.

"Verdkata Testamento" de Raymond Schwartz. Centra Librejo Esperantista, 31 Rue de Clichy, Paris. 125 pp. papero.

A volume of humorous poems—written evidently in a spirit of fun. To the reader of humorous poetry this book will be of interest and prove a restful change from the reading of the more pretentious writings of a serious nature. There is no shadow of gloom pervading its author or his work, his humor is evident through the entire book.

The price is not quoted.

"Universala Esperanta Lernolibro," de D-ro A. Mobusz. Ellersick & Borel, G. m. b. H. Berlin und Dresden. Parto I, 115 pp. papero. prezo 2 RM. Parto II, 32 pp. papero, prezo .50 RM.

Part I is for the use of teachers. Part II is the book to be used by the pupils. The entire course is designed for teaching in

classes, or privately with the help of a teacher, although it can

be used to advantage for self instruction.

D-ro A. Mobuza is the direktoro de reallernejo en Lubeck and has had a wide experience in the teaching of languages. The course is unlike the general examples to which we are accustomed. All is done in Esperanto, required translations are to be made by the teacher. The two books present a course of instruction that is well worth the consideration of teachers and we earnestly hope that teachers of Esperanto will give this course their careful consideration with the purpose of adopting it.

"Biblioteko Tutmonda," No. 1. Rudolf Mosse, Berlin.

This volume is the first of a proposed set of several volumes to be issued one volume each month. Each volume consists of 64 pages and every ten volumes will form a series. No volumes are to be sold separately, they can only be procured by subscribing \$1.25 for each series, delivered as received.

Series No. 1 contains the writings by Merimee, translated by Borel. Van Eeden, tanslated by Bulthuis. Baudovin, original in Esperanto. Karinthy, translated by Bodo. Inglada (2 nos.) original in Esperanto. Bratsocu Voinesti, translated by Morarin.

Penndorf, original.

These volumes will be of interest to all lovers of pure literature and translated by the best of available talent, we earnestly advise their consideration.

The first two of the series are ready for delivery at this of-

fice.

"Kompleta Traktado pri la Prepozicioj, Veraj kaj Ŝajnaj, kaj pri la Akuzativo per Ekzemploj en Esperanto," de Alberto Mair, Fakinstruisto, Vieno, xvi, Hasnerstrasse 103. 70 pp. 7½ x 4½.

papero, prezo .50.

A help that all Esperantists ought to have and constantly study. It is a work of importance. It treats with great clearness all of the prepositions, real and seeming, and of the accusative, as its title implies. Its treatment of De, its most used preposition, is exhaustive and to its analysis four valuable pages are devoted. We quote a few lines written by the author, and we earnestly urge the careful and continued study of this important work.

Unu el la plej malfacilaj ĉapitroj ĉe la ellernado de fremda lingvo estas la aplikade de la prepozicioj kaj la uzado de la kazoj.

Ankaŭ en Esperanto tiuj ĉi malfacilaĵoj ekzistas, kvankam ties logika strukturo evitigas multajn aliajn malfacilaĵojn de naciaj lingvoj.

Tial mi opinias, ke tiu ĉi verko kontentigos urĝan, jam de longe sen-

titan bezonon, eĉ ĉe la progresintaj lernantoj de Esperanto.

Per ĉirkaŭ 1500 ekzemplaj frazoj, precipe el verkoj de Dro. Zamenhof kaj aliaj eminentuloj (Kristaller, Bennemann, Kabe, Privat, Lippmann, Loy ktp.) mi klopodis klarigi kaj lertigi la fervoran Esp—iston pri tiuj temoj. "Palaco de Danĝero," by Mabel Wagnalls, author of "Rozujo Ĉiumiljara," reviewed in October A. E. We omitted to state that this book is from the publishing house of Hirt & Sohn, Leipsig, Germany, who are also the publishers of the series of "Internacia Mondo Literaturo" and other books of real value. "Palaco de Danĝero" has 206 pp., elegantly bound in cloth, with an artistic cover and beautifully printed. It is an ideal gift book, a story of interest, written and translated by Americans, and as noted in the October issue, can be obtained from our office at \$1.50.

BIBLIOTEKO TUTMONDA ELIRAS!

Post forigo de kelkaj malfacilaĵoj, kiuj prokrastis la efektivigon de nia projekto, ni nun povis komenci la eldonadon de nia Biblioteko Tutmonda sub la gvidado de D-ro Ernst Kliemke. Kvankam la antaŭmendoj ne atingis la unue deziritan nombron, ni tamen kuraĝas eldoni la bibliotekon, fidante al la forto de la Esperanto-movado. Ni fidas ankaŭ al la kompreno de la Esperantistaro, kiu espereble ekkonos nian bibliotekon kiel tion, kion ĝi volas esti: grava helpilo por la disvastigo de Esperanto kaj valora pliriĉigo por la Esperanta literaturo. Konsiderante ĉi tion, la Esperantistaro helpu sukcesigi nian entreprenon per mult-nombraj abonoj je Biblioteko Tutmonda tiel, ke ĝi troviĝu en la libraro de ĉiu Esperantano!

Pri kelkaj ŝanĝoj, kiujn ni faris kontraŭe al la projekto, anoncita en la unua informa prospekto pri la entrepreno, ni ŝuldas

klarigon al la interesiĝantoj.

Ĉefa ŝanĝo estas tiu de l' nomo de la biblioteko. La nuna nomo estas pli trafa ol la unue elektita, ne nur laŭ nia opinio, sed ankaŭ

laŭ tiu de multaj kunlaborantoj.

Krome ni ŝanĝis la abonkondiĉojn. Multaj interesiĝantoj ne povis aboni laŭ la unua alvoko, ĉar la antaŭpagota sumo por unu serio de 50 numeroj estis tro granda por ili. Pro tio ni malpligrandigis la seriojn ĝis nur 10 numeroj. * * * * * Ni devis proporcie iom altigi la abonprezon, ĉar montriĝis necese, pliampleksigi la unuopajn numerojn; anstataŭ 40, unu numero nun enhavas 64 paĝojn.

Kompreneble tiuj abonintoj, kiuj ĝis la 31a de Marto n. j. jam pagis por 50 numeroj laŭ la malnovaj kondiĉoj, ricevos ĉi tiun nombron por la sendita mono. Jen rekompenco por ilia iom longa atendado. De post la 1a de Aprilo, n. j. validas nur la supre cititaj novaj abonkondiĉoj. Unuopajn kajerojn ni ne intencas

vendi, ĉar precipe la sistemo de abono laŭ serioj ebligas al ni la fikson de ekstreme malalta prezo ponumera.

Fine ni ŝanĝis la elirmanieron de la biblioteko: Ne ĉiusemajne

elvenos numero, sed ĉiumonate du ĝis tri numeroj.

Titolaro de la unuaj tri serioj

(Ŝanĝoj estas rezervitaj)

Serio 1a: Merimee, Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj. El la Franca tradukis Borel. Van Eeden, La Malgranda Johano. El la Nederlanda tradukis Bulthuis (3 n-oj). Baudouin, La Arto de Memdisciplino (Psikagogio). Originalo. Karinthy, Norda Vento (Novelkolekto). El la Hungara tradukis Bodo. Inglada, La Sismologio (tertremoj, vulkanoj). Originalo (2 n-oj). Bratescu-Voinesti, Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj. El la Rumana tradukis Morariu, Penndorf, El Grekaj Papirusoj. Originalo.

Serio IIa: La Aventuroj de Munchhausen. El la Angla tradukis Applebaum (2 n-oj.). Puŝkin, Kapitan-finino. El la Rusa tradukis Ŝodlovskaja (2 n-oj.). Collinson, La Homa Lingvo. Originalo. Korĉak: Rakontoj Bonhumoraj. El la Pola tradukis Weinstein. Bujwid, Higiena Vivado. Originalo. Babits, La Cikoni-kalifo. El la Hungara tradukis Bodo (2 n-oj.). Bovet, La instinktoj de la infanoj kaj ilia valoro por la edukado. Originalo.

Serio IIIa: Kemio en la hejmo. Originala (2 n-oj). Korolenko, La Sonĝo de Makaro. El la Rusa tradukis Ŝidlofskaja. Kenn, La Penso de Konfucio. Originalo. Konstantinov, Elektitaj Felietonoj kaj Rakontoj. El la Bulgara tradukis Krestanoff. Por la ceteraj kvin numeroj la temoj ankoraŭ ne estas definitive elektitaj.

> En Aprilo 1926 Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Berlin SW 19 (Germ.), Jerusalemer Strasse 46-49.

WHAT A LAWYER SAYS

"I have had quite a lot of experience in the use of Esperanto with foreigners both by correspondence and personal contact, chiefly, of course, the former.

"Previous to the war I had carried on a correspondence without the slightest difficulty with people practically all over the world, and had made a number of friends whose acquaintance I valued highly.

"One was a Russian holding an official position, who sent me a photo of his family and a group photo of an Esperanto Club of which he was a member, taken on the occasion of one of their summer tramps. Among those shown in the group were a Russian colonel and his daughter. The war broke off our intercourse,

and I have heard nothing since.

"As to personal contact, I had gone to Paris with my wife for the purpose of attending the Congress to have been held there in 1914. On the day we arrived war was declared, and we were obliged to leave for England the following day. For the first time I had gone over without a passport. The office of the Canadian agent in Paris was closed on the day of all others when it should have been wide open, and I was obliged to go to the British Embassy to secure a document which would vouch for me. But how to find it? The only person in Paris who was able to understand my 'French' easily was an old woman whom I met on the street, who spoke in a way easily understood by me, but in this case she could not help. Finally, after a long search, a soldier standing at the gate of one of the French barracks noticed my Esperanto button, and addressed me in Esperanto. I explained my difficulty, and was directed to the Embassy, and secured the required document.

"On another occasion, after the Antwerp Congress (I think it was in Hamburg) I was on the point of leaving for England, and had run short of small change. I searched in vain for a broker's office where I could secure the small cash required, and was about tired out, when a couple of gentlemen passing me noticed that magic star. They promptly stopped, spoke to me in Esperanto, learned what I wanted, and turning about accompanied me to a broker's, and, after that, we passed about an

hour together very pleasantly.

"I have had quite an extensive correspondence in connection with my duties as Delegate of the U. E. A. The letters for the greater part have been in connection with living conditions in Canada and the chances of securing employment, but one was of a different type. It came from a medical man in Poland, and stated that advertisements had appeared in their papers offering employment at high salaries to school teachers in Western Canada. I at once wrote to the proper official in Manitoba, and received information that the advertisement was a trap and communicated the result to my correspondent."

J. M. Geldert, K. C., Ll. B., Halifax, Nova Scotia.

A COLLEGE PROFESSOR'S EXPERIENCE

In a letter received from Prof. J. J. Knappe, of Wartburg College, Clinton, Iowa, he says, "I have made good use of [Esperanto] both for personal and PROFESSIONAL use, or I might

say in a threefold way: having it out with overseas Esperantists about various topics, especially philosophy, ethnology and music, as delegito [local representative of the Universal Esperanto Association] answering the usual variety of questions to which most American delegitoj are subjected, and, finally, exploiting Esperanto as informilo [means of getting information] in my capacity as teacher of history, getting first-hand information from many parts of the globe—if not prolific as to quantity, quite satisfactory as to quality. The Esperantists seem to be, on the whole, a comparatively well-posted lot, I am including some of the 'savages of the South Seas.'

FROM A CANADIAN FORESTRY ENGINEER

Says Ellwood Wilson, of Grand'Mere, Quebec, "I have been a delegate of the UEA [Universal Esperanto Association] for a great many years, and an Esperantist for nearly twenty years. I have had a great deal of pleasure and profit from the use of Esperanto with foreigners. For many years I corresponded with one of the foresters of the Spanish Government, to our mutual pleasure and advantage. I have found Esperanto invaluable. It has opened up to me many fascinating books which I could not possibly have become acquainted with otherwise... Here in this Province, one is lost without French, and for those of us who take up this language later in life, it is a difficult attainment."

A REMINISCENCE OF THE SIXTH CONGRESS

By Julia Goldzier, Bayonne, N. J.

It was in the year that Dr. Zamenhof came to the United States and spent a couple o' days in New York City, that I met the Spanish delegate to the then-convening Esperanto Congress. We were introduced, and immediately babbled Esperanto to beat the band, according to our not too proficient capabilities.

We helped each other where we could; and let it go at that where we couldn't.

This went on hours upon hours from early morning to late at night. At last, being overstrained by this unaccustomed exertion I said in good, true-blue, dyed-in-the-wool, honest-to-goodness Anglo Saxon, "I'm so tired, I feel I couldn't speak or understand another word of Esperanto."

The handsome, natty, courteous Spaniard answered in his own native tongue—at least so I presumed for I didn't understand a single blessed word of the fluent, overwhelming gibberish he poured upon my innocent, unprepared ear. However, I was made to comprehend that he didn't understand even a little bit of English.

So we resumed enough of our Esperanto to say how wonderful is this language which enabled us to commune intelligibly, though our native languages were unknown to each other, and though we were not yet sufficiently proficient with the new, and newly acquired common language.

FOR THE BEGINNER

KION LA LUNO RAKONTAS

(What the moon tells)
By Jeanne Morrens (Belgium)

Se vi bone rigardas la lunon, vi vidas ŝpinistinon en ĝi. Ĉu vi scias, kiel tiu laboristino alvenis tien? Jen kion la luno rakontas

pri tio:

En iu flandra vilaĝo loĝis vidvino kun sia filino, la belega Magdanjo. (Senkulpigu min, mi ne plu memoras la nomon de tiu vilaĝo, tamen tio neniel gravas, ĉu jes?) Tiuj du personoj estis malriĉaj, eĉ tiel malriĉaj, ke la musoj mortis en la manĝo-ŝranko. Antaŭe ili loĝis en belega kastelo kun granda lageto, ĉirkaŭ kies bordoj tre maljunaj arboj kreskis kaj speguliĝis en la kvieta revanta akvo. Pintaj turoj sin levis super la aliaj konstruaĵoj; konstante tintis belsonaj sonoriletoj. Estis vera sorĉa kastelo.

Magdanjo estis la plej belega knabineto de l' mondo kaj ŝiaj bluaj okuloj ensorĉis ĉiujn. Iun tagon ŝi rigardis tre junan princon kaj ridetis al li; samtempe li ŝanĝiĝis en neĝoblankan birdeton. Tiam la patrino kaj filino iĝis ege malriĉaj; ilia kastelo flu-

gis al la luno kaj ili ne plu havis monon.

Dum iu vintra vespero la patrino kaj filino sidis hejme kaj tremis pro malvarmo kaj malsato. Iliaj okuloj estis ruĝaj pro ploroj; ili lamentis kaj ĝemetadis tiel forte, ke ŝtona koro rompiĝus. Oni frapis subite sur la fenestra vitraĵo. La bela Magdanjo malfermis la fenestron kaj blanka birdeto enflugis la ĉambron. La ĉarma birdeto havis unu ruĝan kaj unu nigran plumetojn en sia vosteto. Estis la ensorĉita princo. Magdanjo timis kaj ne forlasis sian patrinon.

"Patrinjo," diris la birdeto, "tial ke vi estis malrica kaj tamen restis honestaj, la sufertempo estas for. Vi povas elekti inter du

objektoj: Laboro kaj Mono."
"Laboron," krias Magdanjo.

La beleta birdo elprenis la ruĝan plumeton el sia vosteto, kaj tuj ekaperis en la ĉambro ŝpinilo. Diris la princo: "Ŝpinu nun tiom, kiom vi povas. Vi havos pli da laboro ol vi dezirus. Sed Magdanjo, estu obeema. Mi revenos proksiman jaron por igi vin feliĉa. Tamen se vi estas unufoje malobeema,

la puno ne longe forrestos. Adiaŭ!"

La neĝoblanka birdeto estis for, kaj tie kie ĝi sidis subite blanka lilio kreskis. Magdanjo estis tre kontenta pri la agrabla novaĵo. Nun ili kapablis labori, kaj laboro alportas benon. Magdanjo konstruis multajn kastelojn en aero. Ĉu ŝi denove loĝos en palaco?

Magdanjo ŝpinis la tutan tagon kaj neniu en la vilaĝo kapablis tiel bone ŝpini kiel ŝi. Ŝi akiris bone sian panon. La rado rondflugis, la lilio kreskis kaj Magdanjo kantis la tutan tagon.

Fine estis kermeso en la vilaĝo. "Patrino," diris belega Magdanjo, "mi surmetos mian nigran robon kaj brilantajn ŝuojn, kaj poste mi iros al la vilaĝo por danci."

La patrino konsentis, kondiĉe ke ŝi estu ree hejme antaŭ nok-

tomezo; Magdanjo promesis tion, kion la patrino postulis.

Ĝuste je la noktomezo la ŝpinistino dancis ankoraŭ kun la instruisto de l' vilaĝo. Ĉiuj admiris ŝian belecon, ĉiuj volis danci kun ŝi.

La noktogardisto alvenis kaj antaŭsciigis, ke la lumo devas esti estingata. Samtempe Magdanjo aŭdis voĉeton diri: "Iru

hejmen, fraŭlineto, patrino atendas."

Anstataŭ esti obeema, ŝi interbabilis dum kelka tempo. Kiam la sonorilo sonis unu fojon, ŝi kuregis hejmen. Tie la maltrankvila patrino ploris, ŝi pensis, ke ŝia filino ne bone retrovis la vojon. La lilio klinis sian stangon en la malklara lumo de la luno, kaj la floroj velkis. La blanka birdeto frapis konstante sur la fenestrovitraĵo; la vidvino ne kuraĝis malfermi la fenestron; ŝi timis pro la puno. Ŝi do atendis ankoraŭ kelke da minutoj, kiuj ŝajnis al ŝi jaroj.

Fine ŝi aŭdis la malobeeman filinon, kiu eniris tre mallaŭte. "Mi volus, ke ŝi flugu al la luno!" diris la vidvino, "kaj ke tie ŝi

devu ĉiam ŝpini."

Ho ve! la ŝpinilo falis, la lilio rompiĝis de sia stango, kaj la neĝoblanka birdeto enflugis la ĉambron. La malobeema fraŭlineto metis sin genuen kaj petis pardonon. Ŝi ploris, ho ve! Sed la belegaj okuloj ne ensorĉas nun la princon, li havas ŝtonan koron.

"Magdanjo," diris la princo, "vi estis malobeema; la deziro de

via patrino plenumiĝos. Ve devas iri la la luno."

La birdeto flugetis ĉirkaŭ Magdanjo, ĉirkaŭvolvis la belegan filinon per la maldikaj sed fortaj fadenoj de la ŝpinaĵo, ligis la ŝpinilon al ŝia talio, kaj fine flugis kun ŝi al la luno.

Nun Magdanjo sidas ankoraŭ en la luno, ŝi ŝpinas tie tage kaj nokte. Kelkfoje la fadenoj falas teren, precipe dum aŭtuno. Kiam vi estas atenta, vi rimarkos la aŭtunfadenojn ĉe arboj, arbetoj kaj en la herbejoj. Ne detruu la fadenojn: ili ligas fabelon, kaj iu kun facile impresebla koro neniam povas permesi, ke fabelo perdiĝu.

SECOND COURSE IN ESPERANTO

(Continuing old "First Course)

LECIONO XIV

Manĝi kaj trinki

Sufiksoj -aĵ-, -il-

Objekto, kiun oni manĝas, estas manĝ-aĵ-o. Supo, bifsteko, tomatoj, bananoj ktp. estas manĝaĵoj. Tio, kion oni trinkas, estas trink-aĵ-o. Teo, kafo, ĉokolado, limonado ktp. estas trink-

aĵoj.

Por manĝi ni sidas ĉe la manĝotablo en la manĝoĉambro. La tablon kovras pura blanka tuko (tablotuko). Antaŭ ĉiu seĝo oni aranĝas teleron, tranĉ-il-on, forkon kaj kuleron. Ĉiu telero surhavas (sur-havas) la manĝoporcion por unu persono. La ĝenerala en-hav-il-o (enhavilo) por ĉiu unu speco de manĝaĵo estas plado. La solidajn manĝaĵojn ni manĝas per tranĉ-il-o kaj forko. Per tranĉ-il-o ni tranĉas (dividas) la manĝaĵon je oportunaj pecoj por maĉi. La sufikso -il- signifas "instrumenton." Ekzemple: komb-il-o estas instrumento por kombi (la harojn); fotograf-il-o estas instrumento por fotografi; per telefona ricev-il-o ni aŭdas telefone; per mezur-il-o ni mezuras; per batal-il-o oni batalas; per propagand-il-o ni propagandas Esperanton. Manĝaĵojn fluidajn (ekzemple supon) ni manĝas per kulero. La trinkaĵoj estas apud la teleroj en glasoj (ekz. akvo aŭ limonado) aŭ en tasoj (ekz. teo aŭ kafo). Sub la tasoj estas subtasoj. Apud ĉiu telero estas ankaŭ buŝtuko (buŝ-tuko), por viŝi la buŝon kaj manojn. Tranĉilo, forko kaj kulero kune estas manĝ-il-oj. La vorto "ilo" estas sinonimo de "instrumento."

Por matenmanĝo ni manĝas cereal-aĵ-ojn kaj fruktojn, kun buterpano (pano kun butero). Cerealo estas greno, kiun la homoj uzas por manĝi. El cerealoj oni faras (produktas) cerealaĵ-ojn. La skotoj (homoj de Skotlando) tre manĝas aven-aĵ-on. Aveno estas greno, el kiu oni faras avenaĵon. Panon oni faras el tritiko. Kun la cerealaĵo ni trinkas tason da kaĵo aŭ ĉokolado. Kun ĉiu varma trinkaĵo ni prenas sukeron kaj kremon (aŭ lakton). La kremo estas la riĉa parto de lakto. El lakto oni faras buteron kaj fromaĝon (ekz. "Limburger"). La lakto kaj kremo sidas sur la tablo en krucoj. La ĝenerala enhav-il-o de teo aŭ

kafo estas te- aŭ kafokruĉo.

Ekzemploj de fruktoj estas abrikotoj, beroj, oranĝoj, bananoj kaj figoj. El citronoj oni faras limonadon. Citrono estas acida. Sukero estas dolĉa. Nigra kafo estas maldolĉa (mal-dolĉa). En Usono oni tre manĝas ĉe matenmanĝo pampelmojn. Pampelmo estas flava frukto simila al oranĝo en gusto, sed ankaŭ maldolĉa. Fruktoj tre ordinaraj estas pomoj, piroj, persikoj kaj prunoj. El pomoj oni faras cidron. La pomoj kaj piroj ne havas solidajn kernojn, la persikoj kaj prunoj ilin havas. La persikoj havas ŝelon similan al flanelo por la tuŝo. (Ŝelo estas la ekstera kovraĵ-o de frukto aŭ arbo). La prunoj estas purpuraj. El vinberoj (vin-beroj) oni faras vinon. Fari vinon, bieron, viskion ktp. estas kontraŭ la Usona konstitucio.

Ĉe tagmanĝo ni komencas per supo. Post tio ni havas viandon kaj legomojn. Viando estas besta manĝaĵo: ni ricevas ĝin de la bestoj. El bov-in-o ni ricevas lakton kaj viandon. La viando el bovo aŭ bovino estas bov-aĵ-o. El bovaĵo oni faras bifstekon kaj kotletojn. El ŝafoj ni ricevas ŝaf-aĵ-on. La Dudek-tria Psalmo enhavas alegorion pri ŝafoj. El porkoj ni ricevas pork-aĵ-on. Kokoj kaj kok-in-oj estas birdoi, el kiuj ni ricevas viandon, kaj el la kokinoj ankaŭ ovojn. La ovoj, interne de la ŝeloj, enhavas du partojn: la blank-aĵ-on kaj la flav-aĵ-on. Ei ovoj oni faras ov-aĵ-on. Ordinaraj specoj de legomoj estas pizoj, karotoj, tomatoj, maizo, terpomoj, faboj, brasiko ktp. Terpomoj similas en formo al pomoj, sed oni fosas ilin el la tero. Fabo estas longa verda legomo, similforma al fingro de mano. El brasiko oni faras "sauerkraut." Florbrasiko (flor-brasiko) estas delikata blanka speco de brasiko. Kun viando kaj legomoj oni uzas mustardon, salon kaj pipron. Salo estas mineralo. Mustardo kaj pipro estas spicoj.

La sufikso -aĵ- signifas "la konkretan rezulton aŭ produkton el io." Ekzemple: skrib-aĵ-o estas tio, kion oni skribas; leg-aĵ-o estas tio, kion oni legas; fluid-aĵ-o estas io fluida; suker-aĵ-o estas io, kion oni faras el sukero; pak-aĵ-o estas tio, kion oni pakas por ekskurso; hero-aĵ-o estas tio, kion faras heroo; kontraŭ-aĵ-o estas objekto aŭ cirkonstanco, kiu obstrukcias nin aŭ niajn planojn. La vorto aĵo estas sinonima kun objekto aŭ afero.

Questions

1. What is the meaning and use of the suffix -aĵ-?

2. With what parts of speech may it be used to form derivatives?

3. Given the words alta (high), frandi, to revel in (food), glacio (ice), konfiti, to preserve, "put up" (fruit), kreski (to grow), supra (upper), akra (sharp), ami (to love), amiko (friend), anstataŭ (instead of), boli (to boil), bruli (to burn), ĉasi, to hunt (game), ĉevalo (horse), esti (to be), fero (iron),

flanko (side), flui (to flow), fotografi, havi, humoro, komerco, konstrui (to build), krei (to create), lerni, najbaro (neighbor), necesa, nova (new), el-pendi (to hang out), pomo, propra (one's own), riĉa, segi, (to saw), ŝpari (to save up), ŝteli, telegrafi, uzi, vasta, vidi, form with the suffix -aĵ- the Esperanto equivalents for the following: "neighborhood, property, a delicacy, fuel, sawdust, news, riches, photograph, telegram, goods (on the market), estate (of deceased), hardware, subject for study, a love affair, an eminence, a humorous sketch, game (product of the chase), a sight, surface, a brew, an amenity, apple dumpling, a substitute, a sharp place, horse meat, a building, a being, a stream, creature, a "shingle" (hung out), a necessity, stolen goods, icecream, utensil, preserves, a plant, wing (of house), savings, a waste."

5. Used as an independent word, what does aĵo mean?

5. What is the meaning and use of the suffix -il-?

6. With what part of speech is it generally used? (N. B. It is not confined absolutely to this part of speech, merely the laws

of logic indicate its principal use therewith.)

7. Given the words fajfi (to whistle), fosi (to dig), haki (to chop), kudri (to sew), segi (to saw), sonori (to ring), ŝlosi (to lock), tondi (to clip), veturi (to travel by vehicle), aboni, to subscribe (to a periodical), adresi (to address), aŭdi, bati (to beat) and ovo (egg), fermi (to shut), flugi (to fly), iri (to go), konduki, to drive (horse), kuiri, lerni, levi (to lift), montri (to show), pafi (to shoot), preni (to take), teni (to hold), turmenti, vidi, form with the suffix -il- the Esperanto equivalents for the following: "vehicle, cooking utensil, handle, bell, fastener (of door or window), addressing machine, stilts, ear-trumpet, reins, wing, tongs, gun, whistle, hatchet, subscription blank, reading glass, lever, saw, spade, key, needle, scissors, hand (of clock or watch), egg-beater, textbook, instrument of torture."

8. What does the independent word ilo mean?

9. Give from the context the meaning of the following new words:

Substantivoj: tuko, tablotuko, telero, tranĉilo, kulero, plado, taso, subtaso, buŝtuko, cerealaĵo, aveno, tritiko, sukero, lakto, fromaĝo, kruĉo, citrono, pampelmo, gusto, pomo, piro, persiko, pruno, kerno, ŝelo, vinbero, vino, viando, bovino, bovo, bovaĵo, ŝafo, ŝafaĵo, porko, porkaĵo, koko, kokino, ovo, terpomo, fabo, brasiko, florbrasiko, salo, pipro.

at the control of the property of the control of th

der Critical Control of

Adjektivoj: acida, dolĉa. Verboj: viŝi, fari, preni, fosi.

Pronomoj: tio, io.

KEY TO "FOREIGN" WORDS IN LESSON XIII

Nokto—night, stelo—star, ĉielo—sky, heaven, Dio—God, mateno—morning, tagmezo—noon, antaŭtagmezo—forenoon, posttagmezo—afternoon, vespero—evening, noktomezo—midnight, fojo—a time, occasion, libro—book, lumo—light; meza—middle; kredi—to believe, tiktaki—to tick, bati—to beat, strike, matenmanĝi—to breakfast, tagmanĝi—to dine, vespermanĝi—to sup, legi—to read, iri dormi—to go to bed, lavi—to wash; ree—again; je—indefinite preposition, with various meanings, depending on context. (All other Esperanto prepositions have a definite and invariable meaning.) The reason for je, and its proper use, will be developed in a later lesson.

VIVANTA MUZEO

Blankula Bando en la Tajgo

En Siberio antaŭ kelkaj jaroj vagadis la bando de Semenov—blankula ĉefo. Estante premita de ruĝuloj, ĝi foriradis pli malproksimen al nordo. Semenov mem fine forkuris Japanujon kaj la bando daŭrigis siajn promenadojn laŭ la tajgo. La tajgo etendiĝas norden mil kilometrojn ĝis la Glacia Oceano.

La bando de Semenov dum unu invado en siberian vilaĝon militkaptis kamparanon Iranovon kaj vagigadis ilin kune. La bandanoj devigis Iranovon kuiri por ili tagmanĝon kaj fari di-

versajn servojn. Tiel pasis ĉirkaŭ kvin monatoj.

Forkuro de Blankuloj

Unufoje dum nokto Iranov sukcesis forkuri de la blankbandanoj. Li komencis serĉiri hejmen: sed en la densaj tajgaj arbaroj li perdis la vojon. Kiam Iranov forkuris de la blankuloj, li prenis pafilon kaj kartuŝojn por ĝi, kio savis lin de malsatmorto: li ĉasis la bestojn, kiuj estis en la tajgo en nekalkulebla kvanto. Unufoje al Iranov fariĝis malbone: subite inter arbetoj li trovis dormantan urson kaj paŝpremis lian piedon. La urso ekkriegis kaj suprenleviĝis. Iranov sukcesis preni pafilon kaj ekpafis. Surde traeĥis la pafo en la tajgo kaj pli ekkriegis la mortvundita urso.

Neatendita Renkonto

Tri tagojn Iranov nutriĝis per ursaĵo, daŭrigante vagi en la tajgo. Sed subite antaŭ li dismoviĝis la arboj kaj en la tralumiĝo li ekvidis malgrandan herbejon. Iranov konsterniĝis. Antaŭ li sur la herbo sidis iu homo strange vestita. Ŝajnis, ke tio ĉi ne estis vivo sed teatro. Tiel same sin vestis la homoj dum tempo de Petro la Granda. La homo ankaŭ timis, ekvidinte Iranovon kaj ekkriis ion. Tiam Iranov malrapide alproksimiĝis la strangan homon kaj ekvidis en liaj manoj pafarkon, la saman, kian oni

uzis dum tempoj de Johano la Severa. La nekonatulo ekparolis. Iranov kun malfacileco komprenis lian diron, pliriĉigitan je malnovaj rusaj vortoj. La nekonatulo alkondukis Iranovon en sufiĉe strangan urbeton. Ĝiaj loĝantoj estis vestitaj en strangaj prapra-pra-avaj kostumoj. Ili ĉirkaŭstaris Iranovon kaj parolis kun li—tamen li malfacile komprenis ilin—ili ĉiam parolis iun strangan parolon.

Antaŭ Tricent Jaroj

Kiam oni estis satiginta Iranovon, maljunuloj sidis en diversaj memkonstruitaj benkoj kaj komencis demandi lin. Siavice Iranov faris demandojn al ili, kaj li eksciis, ke la loĝantoj de tiu ĉi perdita urbo en la tajgo antaŭ 300 jaroj alvenis ĉi-tien kaj de la sama tempo estis deŝiritaj de la tuto mondo. Je unu flanko estas la Glacia Oceano, je tri flankoj la netrairebla tajgo. Regis ilin maljunuloj.

Iranov restis por vivi inter la strangaj homoj. Kiam li rakontis al ili pri civilmilito, pri ruĝuloj kaj blankuloj, kaj pri tio, ke neniuj caroj ekzistis plu—ili lin ne kredis kaj decidis, ke li estas frenezulo. Tamen al Iranov oni rapide alkutimiĝis. Post tri monatoj Iranov edziĝis kun unu el iliaj fraŭlinoj kaj fariĝis plen-

rajta loĝanto de ilia urbo.

En la urbo ĉiuj domoj estas lignaj, ankaŭ estas ligna kremlo laŭ kutimo de malnovrusaj popoloj. La moroj de la loĝantoj estas severe patriarkaj, kaj kiam Iranov indignis je multaj kruelaĵoj kaj malsaĝaj kutimoj—maljunuloj minacis mortigi lin. Oni lin devigis kreskigi barbon, ĉar laŭ ilia opinio razi sin estas peko,

kaj en ilia urbo neestis eĉ unu razilo.

Iranov vivis en la urbo ĉirkaŭ tri jarojn. Sed finfine la maljunuloj, regantoj de la urbo, ekvolis mortigi lin—ĉar al ili ne
plaĉis, ke Iranov komencis klerigi la junularon. Tiam Iranov
forkuris kune kun sia edzino. Post malfacila vojaĝo en la tajgo,
post vico de esploroj, dum kiuj mortis lia edzino, Iranov tamen
atingis vivantajn lokojn. Li komunikis pri la urbo al la Scienca
Akademio dum tiu ĉi somero. Tien oni sendas ekspedicion por
koni ĉi-tiun strangan vivantan muzeon de homoj, kiuj konservis
sian moraron estintan antaŭ tricent jaroj.

El la rusa lingvo tradukis
(laŭ la nordkaŭkaza gazeto "Martelo")

Bazilo Belakov

(Tuapse, Kaŭkazo, Sovjetlando).

We regret that in reporting Dr. Kliemke's greeting at the Philadelphia Congress, he was quoted as saying that there existed in Germany 1200 languages. It was so obviously a typographical error that we did not consider it necessary to correct it in the following issue, but we are now pleased to do so at his request.

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT — A CLASS THEN AND THERE
BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The ESPERANTO OFFICE
Drop us a postcard for a catalog

THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usono

ISOLATED STUDENTS!

The editor of Amerika Esperantisto, formerly chairman of examinations of E. A. N. A. offers

A PRACTICAL CORRESPONDENCE COURSE

in

ESPERANTO

in three terms of fifteen lessons each.

This course is guaranteed to prepare one for the advanced examination of E. A. N. A. and give one a thoro working knowledge of the language.

Instruction is individual, and in case of failure to pass the E. A. N. A. advanced examination upon completion of the course free coaching will be given until the student passes.

Payment is required in advance, but a student may stop work at any time, and fees will be refunded covering the uncompleted portion of the course.

Price of lessons (including constant individual instruction), per term, \$15 (in advance).

Entire course (three terms, in advance) \$40.

Special Elementary Course.

Those following the Elementary Lessons now running in Amerika Esperantisto may receive individual instruction and examination upon these lessons, with guarantee to prepare the student to pass the preliminary examination of E. A. N. A., at the special price of \$5 per term of ten lessons (in advance). Payment subject to refund pro tanto if work discontinued.

Herbert M. Scott, L. K., Moundsville, W. Va.

Save Money on Your PERIODICAL SUBSCRIPTIONS

Lowest Club Rates on Your List.

We make a Specialty of furnishing Magazines of all kinds wherever published, to subscribers anywhere.

Send us your Magazine orders for Quotation

THE PALMER CO.

120 Boylston St. Boston, Mass.

THE COMPLETE BIBLE IN ESPERANTO

NOW READY

- Art Vellum, Ordinary paper \$1.75
 Art Vellum, India paper,
- gilt top 2.50
 3. Persian Morocco, India paper,
- gilt top

 4. Yapp, leather lining, India pa-
- per, gilt top 5.50
 THE ESPERANTO ASSOCIATION

OF NORTH AMERICA, Inc. 507 Pierce Building, Copley Square

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po paĝo-1/4 paĝaj aŭ pli-10 numeroj sen ŝanĝo \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

PRICES BIBLE SUBJECT TO CHANGE

STUDY ESPERANTO



ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language
Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross

The World Union of International Associations

The French and Italian Associations for the Advancement of Science

The French Academy of Sciences

The International Women's Suffrage Alliance

The International Peace Bureau The International Labor Office

The World Union of Women

The Catholic International League of Youth The Young Men's Christian Association

The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,

Malmoe, and Helsingfors

The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY
By vote of September 21, 1922

HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of NORTH AMERICA

and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)

The Central Office of the Esperanto Association of North America
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies